Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031

# IPR

NTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Jarkolekto 35 - trimonata
05/3

**dakta komitato:**
:efo Németh (red.)
talin Kováts (vicred.)
igia Oberrauch Madella

**ınlaborantoj**
**la aktuala numero**:
.vid Kelso
.talin Kováts
ırcel Leereveld
lvain Lelarge
an-Marc Leresche
efan MacGill
ena Nadikova
ıdojica Petrovic
.ilio Orellana Rojas
ıtja Steele



ilei

)rgano de Internacia Ligo
e Esperantistaj Instruistoj

## Enhavo

Radojica Petroviĉ: *Lingva kompetento kaj ĝia taksado* ... 3
*Estrara raporto pri la periodo januaro – junio 2005* (Radojica Petroviĉ) ... 8
*ILEI-Konferenco en Kaunas – sekretario raporto* (Atilio Orellana Rojas) ... 12
*InterKultura Simpozio dum la Konferenco* (David Kelso) ... 13
R. Petroviĉ: *Kultura kaj lingva diverseco en edukado – bazaj konceptoj* ... 14
*Dumkongresa lingvoekzercado kun www.edukado.net* (Kováts – Lelarge) ... 20
*El la landoj kaj sekcioj* (IN, BR, FI, FR, HU, JP, US) ... 23
*InterKultura esploro: kiaj ni estas* (Elena Nadikova) ... 28
*Ni kondolencas (†Anita Bergh)* ... 32
*Intervjuo kun Oliver Mazodze* (Katja Steele) ... 32
Por via notlibro: *Manlibro pri Instruado de Esperanto* (Stefan MacGill) ... 35
Reago: *Ni solvis la „galimatiajn" regulojn* (Marcel Leereveld) ... 36
Forumo: *Malfermita fenestro al la mondo* (Jean-Marc Leresche) ... 37

## Estraro de la Ligo

**Prezidanto**: Radojica Petrović, *Bul. oslobodjenja 36/14, SCG-32000 Čačak, Serbio. Tel. (+381) 32 371053. Fakso: (+381 32) 342 101, radp@ptt.yu*
Kunordigado, eksteraj rilatoj, la projekto Interkulturo.
**Vicprezidanto**: Stefan MacGill, *Pannonia u. 30. I/6, HU-1136 Budapest, Hungario. Tel. (+36 1) 349-5207, <Stefan.Macgill@gmail.com>*
Juna amiko, lerniloj, Internacia Infana Kongreseto (komisie de UEA)
**Sekretario**: Atilio Orellana Rojas, *Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando. Tel. (+31 70) 3556677, fakso: (+31 70) 358 4422, <iei001@tiscali.nl>*
**Vicsekretario:** vakas
**Estrarano pri financoj**: Sjoerd Bosga, *Tråddragargatan 27D, SE-723 37 Västerås, Svedio. Tel. (+46 21) 41 70 45, sjoerd@esperanto.se*
**Estrarano:** Aida Čižikaitė, *Zamenhofo g. 5, LT-44287 Kaunas, Litovio. Tel. (+370) 37 208503. <aidute@mail.lt>*. Konferencoj.
**Estrarano**: Mauro La Torre, *Dipartimento di Scienze dell'Educazione, Università Roma Tre, Via Castro Pretorio, 20, IT-00185 Roma, Italio. Tel.: (+39) 06 44 62 092 aŭ 06 49 57 805, fakso: (+39) 06 49385673, mauro.latorre@uniroma3.it; http://host.uniroma3.it/docenti/latorre/ Universitata kaj scienca agadoj.*
**Estrarano:** Hokan Lundberg, *c/o stan Pivalica, Tadeuša Koščuška 80/18, SCG-11000 Beograd, Serbio. Tel. (+381 11) 188 496, hokan@ikso.net*
Retprojektoj, junulara agado, informado.

Titolpaĝo: *UK 2005 - Hernández Angulo (Kubo) kantigas la kursaron de edukado.net kaj la sukcesintojn de la ILEI/UEA ekzamenoj. (Foto: K. Kováts)*



# Lingva kompetento kaj ĝia taksado

Dum la lastaj jaroj ILEI ricevis kaj plu ricevas informojn kaj proponojn pri novaj kaj novtipaj ekzamenoj, kaj petojn aŭspicii ilin. Tio estas rezulto de evoluanta praktiko de E-instruado inkluzive de novaj instrumetodoj kaj lernteknologioj. Aliflanke la tradicia sistemo de Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA ĉiam pli montras la simptomojn de maljuniĝo kaj ekstempiĝo. Por diri la veron, ĝi eĉ neniam ekvivis plenspire en ĉiuj siaj segmentoj. El la tri niveloj nur la elementa kaj meza estas aplikataj, la supera apenaŭ okazis iam antaŭ longa tempo. La nove aprobita modelo de ekzameno de instrukapablo de E-o[1] rapide montriĝis mortnaskito. Neniu ĝis nun sukcesis vivigi ĝin en la proponita formo. Ekster Esperantujo dume la teorio kaj praktiko de lingvoinstruado disponigas novajn konceptojn kaj atingojn. Estas tasko de ILEI subteni ilian akceptadon, adaptadon kaj aplikadon konforme al bezonoj de la E-komunumo.

### *Lingva kompetento*

En la ekzamenoj de ILEI/UEA la kvar lingvokapabloj laŭ la tradicia modelo (aŭskulta, lega, parola kaj skriba), regado de la gramatiko kaj scioj pri la E-kulturo estas taksataj. En lingvistiko kaj lingvodidaktiko hodiaŭ ekzistas diversaj aliroj difinantaj pli ampleksan koncepton de la *lingva kompetento*. Ekzemple, la modelo de *Komunika kompetento* [1], per siaj kvar komponantoj rilatas al scioj bezonataj por uzi la lingvon en sencohava interago:

- **gramatika kompetento**: kapablo uzi formojn de la lingvo (sonoj, vortoj, frazstrukturoj);
- **teksta kompetento**: kapablo kompreni kaj krei formojn pli longajn ol frazo (ekzemple: historioj, konversacioj, negocleteroj) inkluzive de kompreno kiel la teksto rilatas al kunteksto en kiu ĝi estas uzata;
- **socilingvistika kompetento**: kapablo uzi la lingvon adekvate en diversaj kuntekstoj depende de normoj kaj atendoj en diversaj kulturaj fonoj (ĝentileco, formaleco, intimeco, atento pri socistatusaj diferencoj, dozado de malkonsento, esprimado de emocioj, humuro, maldeco);

[1] La prian regularon aprobis la Komitatoj de UEA kaj ILEI en Telavivo, 2000, kaj Lovran, 2001, respektive.

- **strategia kompetento**: kapablo elturniĝi en malfacilaj komunik-situacioj aŭ ĉe nesufiĉa gramatika, teksta aŭ socilingvistika kompetento uzante posedatajn lingvokonojn kaj neparolformajn komunikilojn (gestoj, signoj, mimado).

Katalin Kováts en [2], ĉapitro 1.2, prezentas iom alian modelon sed la esenca enhavo estas sama. Duncan Charters en [2], ĉap. 9.2.2, prezentas la Usonajn normojn pri lingvoinstruado, kie la komunikado estas unu el kvin kriterioj sur kiuj baziĝas la normigo. Ne estas celo de ĉi tiu artikolo esplori kaj kompari diversajn alirojn al la koncepto de lingva kompetento, sed pensigi pri evoluigo de kriterioj kaj normoj pri *lingva kompetento en Esperanto*.

***Normoj, taksado kaj memtaksado***

Katalin Kováts en [3] emfazas: *Se e-istoj en Eŭropo volas, ke E-o estu konsiderata kiel egalranga kun la aliaj naciaj lingvoj, kaj ilia celo estas uzi kaj uzigi ĝin kiel internacian komunikilon ankaŭ politiknivele, ankaŭ en Esperantujo oni devas koni la dokumentojn de la Konsilio de Eŭropo kaj instrui kaj taksi E-on laŭ ties normoj.*

Ĉiam pli aŭdeblas ĉi tiaj voĉoj dum la lastaj jaroj. Eventuala rimarko kiun mi volus diri pri tiaj emfazoj estas la demando: Kial aŭ ĉu nur en Eŭropo? La respondo estas: ne nur en Eŭropo, sed jes Eŭropaj normoj por instruado de E-o en Eŭropo. Katalin klarigas:

"Laŭ mi estus grava eraro deklari, ke ĉie en la mondo oni devas adapti la eŭropajn normojn. En Azio, Afriko kaj aliaj mondopartoj oni decidu mem al kiuj normoj oni provas proksimigi la normojn starigotajn por E-o. *Sed*: ni povas montri kion ni faras en Eŭropo, oni povas studi ĝin kaj utiligi el ĝi kion oni volas. Usonaj esperantistoj same ne transprenus la eŭropajn normojn. Ili faras siajn, sed ĉiam komparante kion "oni faras, diras, decidis" en Eŭropo. Ĝenerale, la unua tasko devas esti akceptigi E-on en la propraj landoj, regionoj. Por tio E-o devas sekvi tiujn normojn, kiujn la aliaj fremdaj lingvoj havas en la koncernaj lokoj. Nur duarange gravas universaligi la normojn por E-o".

La menciitaj dokumentoj de la Eŭropa Konsilio certe estas bona inspirmodelo kaj startbazo por modeli la lingvan kompetenton pri Esperanto, ĝiajn normojn kaj takskriteriojn por la instruado de Esperanto en Eŭropo. Tiuj dokumentoj jam estas prezentitaj al esperantistoj sur la paĝoj de [2], ĉap. 9.2.1 kaj 12.7, kaj en retpaĝoj de edukado.net [3].



La *Komuna Eŭropa Referenckadro por Lingvoj – Lernado, Instruado kaj Taksado* [4], estas sesŝtupa taksonomia normaro de lingva kompetento pri ajna studata lingvo. Ĝi difinas tri nivelojn kaj en ĉiu po du ŝtupoj de lingva kompetento kun priskriboj laŭ kiuj eblas klasifiki lingvouzanton en iun el la ŝtupoj:

- Baznivela uzanto: ŝtupoj A1 kaj A2
- Memstara uzanto: ŝtupoj B1 kaj B2
- Kompetenta uzanto: ŝtupoj C1 kaj C2

Konsista parto de la Referenckadro estas matrico por memtaksado de kvin lingvokapabloj:

- Aŭskulta kompreno
- Lega kompreno
- Parola interago
- Parola produktado
- Skribado

laŭ la ses ŝtupoj A1 – C2.

La *Eŭropa Lingva Dokumentujo* [5] estas dokumentaro per kiu lernanto aŭ lerninto de lingvo povas noti kaj dokumenti siajn lingvolernadon kaj kulturajn spertojn. Ĝi konsistas el tri partoj: *Lingva pasporto*, *Lingva bibliografio* kaj *Dosiero*. Pli detala priskribo legeblas ĉe edukado.net [3]. Ĝiaj celoj estas:

– motivigi lingvolernantojn per rekonigo de iliaj klopodoj
– provizi pruvilojn pri lingvaj kaj kulturaj scipovoj.

Surbaze de la ĝenerala modelo de lingva dokumentujo kaj komuna referenckadro, Validiga Komitato de la Konsilio de Eŭropo validigis 69 naciajn modelojn de Eŭropa Lingva Dokumentujo. En kelkaj landoj ekzistas diversaj modeloj por diversaj aĝgrupoj, aŭ eĉ por diversaj regionoj. Ĉu Modelo por E-o povus fariĝi la 70-a validigita?

Sed la Eŭropaj Referenckadro kaj Lingva Dokumentujo ne estas la solaj provoj kaj rezultoj pri normigo de la lingva kompetento kaj ĝia taksado. En Usono pri tio okupiĝas la Amerika Konsilio pri Instruado de Fremdaj Lingvoj (ACTFL – *American Council on Teaching Foreign Languages*) kiu difinas iom aliajn kriteriojn kaj normojn, resume prezentitajn en [6], ol validas en Eŭropo. D. Charters jene priskribas la ĉeftrajtojn kaj evoluvojon de la aliro de ACTFL inkluzive de paŝoj por ellabori similan normaron por E-o:

"Ekde 1981, ACTFL evoluigis sistemon por mezuri kompetenton en la uzado de fremdaj lingvoj kiu sekvis dudek jarojn da sperto pri la trejnado

kaj ekzamenado de kandidatoj por eksterlandaj postenoj de la usona registaro. Apartan atenton ricevis la parola kompetento, kiun oni mezuris per individua intervjuo kutime 15-20 minuta. La normoj celis indiki ĝis kiu nivelo kapablis komuniki en la eksterlanda kulturo la ekzamenito. Post tio, ACTFL kreis kaj oficialigis en la naŭdekaj jaroj novajn normojn laŭ kvin kriterioj, el kiuj komunikado estis nur unu. La aliaj estis Kulturo aŭ Kulturoj, Konektoj (rilatoj kun aliaj lernobjektoj aŭ studterenoj), Komparoj (inter la konata kaj la nekonata) kaj Komunumoj (specifa konatiĝo kun la komunumoj de uzantoj de la lingvo). Ĉiuj lernoceloj devas direkti sin al tiuj kvin kriterioj, ne nur al la komunika. Dum la somero de 2005, kun subteno de ESF[2] malgranda teamo kunlaboris kun la iniciatinto de la projekto por krei normojn kiujn povus akcepti ACTFL, kaj ellaboris normaron por E-o similan al tiuj kreitaj por aliaj lingvoj. Tiu dokumento estos baldaŭ eldonita."

Kion pri la aliaj kontinentoj aŭ landoj? Espereble ni legu pli pri tio sur la paĝoj de *IPR* el klavaroj de kolegoj el diversaj mondopartoj.

### Taksado de lingva kompetento en Esperanto

La aktuala ekzamensistemo de ILEI/UEA havas kelkajn bremsajn faktorojn kiel montriĝis en la praktiko kaj pro kiuj la jara nombro de sukcesintoj en la ekzamenoj ne superas 100. La nombro de aspirantoj estas multe pli granda. Pri administrado de la ekzamenoj, difinado de kriterioj, rajtigo de ekzamenantoj, starigo de ekzamenkomisionoj kaj produktado de ekzamenmaterialoj kompetentas nur unu seskapa instanco – la Internacia Ekzamena Komisiono (IEK) – kies membroj plenumas tiun taskon kiel volontuloj, paralele kun siaj tempopostulaj profesiaj okupiĝoj. Por aliaj fremdaj lingvoj en ĉiu lando tiun laboron faras pli multaj homoj kaj institucioj kun pli abundaj rimedoj je dispono.

Estas ankaŭ aliaj limigaj normoj en la Regularo pri ekzamenoj pro kiuj en iuj regionoj praktike ne eblas organizi ekzamenojn. Bezonataj estas reformoj de la ekzamensistemo en du direktoj:

- *organiza*: krei reton de rajtigitaj institucioj por plenumado de ekzamenoj de la lingva kompetento en E-o kaj lasi al IEK normigajn, kontrolajn kaj validigajn kompetentojn

[2] Esperantic Studies Foundation, http://www.esperantic.org



- *faka*: redifini la kriteriojn kaj normojn de lingva kompetento kaj instrukapablo pri E-o konforme al oficiale validaj normoj de lingvoinstruado kaj lingvolernado.

### Konkludo

La defioj de multlingveco en la disvastiĝanta EU kaj atingoj de lingvistiko, instrumetodoj kaj instruteknologioj skuis la E-didaktikon: kiel progresigi la instruadon kaj lernadon de E-o, kaj kion instrui al esperantistoj kaj per E-o pri informado kaj utiligado, pri kulturo kaj valoroj de E-o, pri interkultureco kaj rolo de E-o en la mondo de kultura kaj lingva diverseco? Tio vekas krean energion kaj organizpolitikajn ŝanceliĝojn en Esperantujo pri tio, kiel plej bone adaptiĝi al la ŝanĝiĝantaj cirkonstancoj?

Ĉu ILEI havos sufiĉan forton kaj adekvatajn velojn por kapti bonan venton kaj navigi en bonan direkton? Normigo kaj reordigo de taksado de la lingva kompetento pri E-o estas unu el la bezonataj veloj, kiu tamen ne multe helpos sen kompetentaj instruistoj kaj adekvataj ekzamenoj pri instrukapablo. Aktivigo de disponeblaj homfortoj kaj certigo de bezonataj rimedoj estas la nepraj faktoroj de sukceso.

IEK kaj la Estraro de ILEI estas traktantaj la problemaron. En estrarkunsido okazonta en novembro 2005 estos aprobitaj konkludoj kaj plano de pluaj paŝoj en ĉi tiu kampo.

### Rekono

Mi dankas al Duncan Charters kaj Katalin Kováts kiuj kontrollegis la unuan version de ĉi tiu artikolo, atentigis pri necesaj korektoj, rekonsideroj, pliklarigoj kaj kompletigoj, kaj mem kontribuis al ĝi.

*Radojica Petrović, radp@ptt.yu*

REFERENCOJ

[1] *Language Competence*, Southwest Missouri State University, http://www.missouristate.edu/vlc/languagelearning/competence.asp
[2] Katalin Kováts (red.): *Manlibro pri Instruado de Esperanto – 2-a, kompletigita eldono*, ILEI, 2005
[3] Katalin Kováts: Eŭropa Lingva Dokumentujo - enkonduka artikolo, http://www.edukado.net/pagina/Legejo/149//#691
[4] http://www.culture2.coe.int/portfolio/documents_intro/common_framework.html
[5] http://culture2.coe.int/portfolio/
[6] *Standards for Foreign Language Learning – Preparing for the 21st Century*, ACTFL, http://www.actfl.org/files/public/execsumm.pdf

# Estrara raporto pri la periodo januaro-junio 2005

**Estrarkunsido**

La Estraro de ILEI kunsidis de la 18a ĝis la 20a de februaro 2005 en Budapeŝto en kombino kun la tradiciaj Pedagogiaj Tagoj (19-20 Feb) organizitaj de la hungara ILEI-sekcio, kaj kun ĉeesto de la prezidanto de UEA *Renato Corsetti*. Estis traktataj strategio kaj prioritatoj de ILEI, estrara taskodivido, eldonado, konferencoj, buĝeto, projektoj, rilatoj kun UEA kaj eksteraj rilatoj – precipe kun Unesko.

**Organizaj aferoj**

*Estraro*

Post la demisio de *Aleksandr Blinov* plifortiĝis la manko de laborfortoj en la Estraro. Precipe mankas respondeculoj pri *IPR* kaj eldonado ĝenerale, informado, instrukapabligado kaj lerneja agado. La kunigo de la postenoj de sekretario kaj estrarano pri konferencoj montriĝas troŝarĝa por unu persono. La nova kandidato por estrarano *Aida Čižikaitė* jam transprenas kaj plenumas certajn taskojn sen formala voĉdonrajto antaŭ la definitiva elekto. Por certaj taskoj estos necese trovi eksterestrarajn kunlaborantojn kaj komisiitojn. La Estraro petas de la Komitato kaj sekcioj helpon por solvi ĉi tiun bezonon.

*Sekcioj kaj membraro*

La membronombro ankoraŭ ne atingis la nivelon de la jaro 2004. Aparta problemo estas kolekti kotizojn kaj vivteni la sekciojn en malriĉaj landoj. Pro tio kelkaj sekcioj apenaŭ plu ekzistas. Por Afriko estas farita interkonsento kun la Fondaĵo Hans por subvencia membrigo de 25 instruistoj el kvin landoj: 5 per la Koleghelpa Kaso de ILEI kaj 20 per mono el la Fondaĵo Hans. Rilate al la Koleghelpa Kaso ĝenerale, la Estraro decidis precizigi per aparta regularo ĝian funkciadon kaj uzadon por fari ĝin pli stimula.

Esperantistaj instruistoj en Danlando kaj Hispanio esprimis deziron fondi siajn sekciojn. La komencita kunlaboro kun kolegoj en Germanio gvidas al efektiva funkciigo de la germana sekcio kiu ĝis nun ekzistis nur surpapere. Necesas esplori eblecon por fondi sekciojn en Vietnamio kaj Mongolio. La problemo de kotizoj kaj sekcia laboro en Ĉinio estas solvata, sed ankoraŭ ne solvita. Ankoraŭ ne ekfunkciis la Azia Komisiono de ILEI, fondita pasintjare en Bratislavo kun la tasko plifortigi la ILEI-agadon en Azio.

*Konferencoj*

Krom la klopodoj konferenci en lando kie UK okazas, ni esploras kunlabore kun UEA kaj Fondaĵo Hans la eblecon konferenci en Afriko. Estas necese elekti novan estraranon aŭ komisiiton pri konferencoj, ĉar la ĝisnuna deklaris neeblon plu plenumi tiun taskon.

*Administrado*

Estas preskaŭ preta kaj parte jam uzata komputila programaro kiu plifaciligos kaj pliakuratigos la administradon de financo, membraro kaj *JA*-abonantoj.

**Projektoj**

*Flugiloj de malfacila vento*

Kiel rezulto de ĉi tiu projekto, kiun realigas E@I kaj ILEI kunlabore, aperas la *Manlibro pri Instruado de Esperanto* en ambaŭ versioj, elektronika kaj papera. Seminario de "*Flugiloj*" ĉi-jare estas planita nur por IJK. La intereso kiun la projekto vekis precipe ĉe junaj esperantistoj kaj instruemuloj kuraĝigas al ĝia daŭrigo. Ĝia aparte menciinda rezulto estas, ke ĝi kunligis en unu teamon plurajn fakulojn kaj agantojn en la fako de E-instruado kaj inspiris al novaj esploroj kaj paŝoj antaŭen en la kampo de E-pedagogio kunligite kun aliaj E-projektoj, precipe edukado.net, *lernu!* kaj *InterKulturo*, kaj nove planata projekto Katedro de ESF.

*InterKulturo*

Plu estas utiligata la retpaĝaro www.interkulturo.net. La averaĝa nombro de vizitoj al la paĝaro kreskis de 66 tage, kiom estis en aŭgusto 2004, ĝis 157 tage, kiom estis en junio 2005. Tamen notindas malkresko de la aktiveco de aliĝintaj IK-grupoj (klasoj). Bezonatas IK-helpantoj por stimuli la grupojn kaj kunordigi la esplorinterŝanĝon pri diversaj temoj. Paĝoj de *Kontakto* kaj *Juna amiko* dediĉitaj al IK fariĝas parto de ĝia komunikstrukturo komplemente al la retpaĝaro. Tio aparte gravas por la grupoj sen retaliro. Estas bezonata plia aktiviĝo de ILEI-sekcioj por popularigi kaj pliutiligi la projekton surterene.

**Internacia Pedagogia Revuo**

Ĝi aperas regule, sed kun oftaj problemoj en liverado al abonintoj, pri kio respondecas FEL kiel presisto kaj distribuanto.

Por plialtigi kvaliton de fakaj kontribuoj en la revuo kaj fari ĝin pli interesa por la sciencaj rondoj, la Estraro decidis fondi Sciencan Komitaton de *IPR*. Pluraj esperantistoj – sciencistoj, pedagogoj kaj fakuloj en la koneksaj kampoj – jam akceptis eniri la komitaton.

**Juna amiko**

La teamo de *Juna amiko* meritas gratulojn pro la unua numero de *JA* aperinta sub la slogano "Pli da gazeto, pli ol gazeto", kun novaj eldonritmo, amplekso kaj fizionomio. Ĝia ekonomio stabiliĝas per ekvilibro inter abonoj kaj kostoj, kaj ĝia rolo plivastiĝas per la kunlaboro kun la projektoj *lernu!* kaj *InterKulturo*.

**Instrukapabligado**

Konsiderante la ĉi-kampajn rezultojn de la projekto "Flugiloj de Malfacila vento" kaj de aliaj porinstruistaj seminarioj de diversaj organizantoj, inkluzive de NASK en Usono kaj Interlingvistikaj Studoj en Poznan, Pollando, la Estraro konstatis la bezonon ordigi pli sisteme la formadon de E-instruistoj, interalie, per *Principaro de ILEI por aŭspiciado de Metodikaj Seminarioj*. Pluaj organizaj paŝoj estas bezonataj.

**Lerneja agado**

*ILEI-lernejoj*

Notinda evento ĉi-kampe estas la patroniĝo de ILEI al la lernejo en Ĉajovice, Pollando. Ĝi kondukas al iniciato fondi tutmondan reton de ILEI-lernejoj, pri kio ĉefe respondecu la sekcioj de ILEI, ĉiu por sia lando. Ĝi ligeblas al la projekto de UEA *Lernejoj por evoluo* (vidu ĉi-sube).

*AKEL*

El Bulgario kaj Italio venas informoj, ke la trilanda (Italio, Britio, Bulgario) lerneja E-projekto *Alternativa Komunikado inter Eŭropaj Lernejoj* akiris subtenon de la subvenciprogramo Comenius.
Gratulon al la projektintoj kaj sukceson al realigontoj.



**Ekstera agado**

ILEI, kunlabore kun UEA, difinas agadstrategion kaj organizas agadon por utiligi la ŝancojn kiujn al Esperanto donas la programoj de UN kaj Unesko por homara evoluo kiuj inkluzivas la kulturajn kaj lingvajn rajtojn kaj protektadon de kultura kaj lingva diverseco kun emfazita rolo de la edukado en realigado de la proklamitaj celoj. Grava partnero de ILEI ĉi-kampe estas FIPLV (universala organizaĵo de lingvoinstruistoj).

**Iniciatoj**

*Malfermiĝo*

Iniciatite de ILEI, en la Strategia Laborplano de UEA aldoniĝis la emfazo *malfermiĝo* al la agaddirekto *tutmondiĝo*. Esence ĝi signifas plian atenton pri aktualaj bezonoj de la homara evoluo en la sfero de kulturaj kaj lingvaj rajtoj kaj plifortigon de kunlaboro de lokaj, landaj kaj internaciaj institucioj en la eduka kaj kultura kampoj.

*Ekzamenoj*

Pluraj organizantoj kaj realigantoj de E-kursoj kaj ekzamenoj, ĉeestaj kaj malĉeestaj, iniciatis kaj petis al ILEI enkonduki aŭ aŭspicii novajn ekzamentipojn kaj atestilojn, interalie por perretaj ekzamenoj. La Estraro konstatis la neceson subteni tiujn iniciatojn, sed ankoraŭ nenio konkreta estis farita en tiu direkto.

*Lernejoj por evoluo*

Temas pri projekto iniciatita en la kampanjo de UEA "Esperanto por evoluo" kun la ĉefideo akiri aŭspicion de Unesko por eksperimenta instruado de Esperanto en lernejoj. La celo estas pruvi efikecon de ĝia lernado kaj ĝian utilecon por la UN/Unesko-programoj de homara evoluo kaj protektado de kultura kaj lingva diverseco. La unuaj lernejoj jam anoncis sin por la projekto, sed estas bezonata pli forta kaj konkreta subteno al la iniciato, precipe de la sekcioj de ILEI.

*Esperantista Lingva Dokumentujo*

La inspiro venis de la Eŭropa Lingva Dokumentujo kaj la unuaj paŝoj estas farataj enkadre de la projektoj *edukado.net* kaj *"Flugiloj de malfacila vento"*. Ĝenerale, temas pri normaro por taksi lingvokonojn kaj dokumentoj por noti personan lingvan kompetenton.

*Esperanto en la universitatoj*

Ĉi tiu iniciato celas plian instigon kaj organizan subtenon al universitata instruado de Esperanto kaj esperantologiaj studoj, sciencan esploradon en la kampoj de interlingvistiko kaj esperantologio, evoluigon kaj aplikadon de modernaj modeloj kaj teknologioj de lingvoinstruado, kaj aplikadon de E-o en aliaj universitataj fakoj.

*La projekto Katedro*

La teamo de nova projekto *KATEDRO* subvenciata de ESF petas helpon de ILEI por ĝia realigado. La celo de la projekto estas pretigi materialon pri instrumetodoj kaj lecionoj por helpi la instruantojn de E-o. La kompleto konsistos el filmoj (DVD) kaj akompana gvidlibro, kun la enhavo: *Teorio kaj historio de lingvoinstruado, Modelaj lecioneroj* kaj *Gvidlibro*.

*Lingva festivalo en UK*

La pozitivaj spertoj de la dumkonferenca LF de ILEI kaj similaj postuloj en la rondoj de UEA estis inspiraj por proponi organizadon de LF dum UK kunlabore de ILEI kaj TEJO.

*Kompilis: Radojica Petrović, prezidanto de ILEI*

## ILEI-Konferenco
### Kaunas, de la 30-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2005

*Sekretaria raporto*

La 38-a ILEI-Konferenco okazis en la urbo Kaunas (Litovio) inter la 30-a de julio kaj la 4-a de aŭgusto 2005. Aliĝis 64 personoj el 26 landoj. La konferenca temo estis 'Interkultura Komunikado en edukado' kaj ĝi estis traktita dum aparta simpozio organizita meze de la konferenca semajno fare de diversaj specialistoj pri la temo. La simpozio okazis kunlabore kun Vilnius Universitato Kaunas Humanisma Fakultato, ĝi estis dulingva (angla kaj Esperanto) kun samtempa interpretado kaj estis malfermita al la ĝenerala publiko.

La programon riĉigis la kontribuoj de diversaj kolegoj pri 'Projekto Bixad' (Mihai Trifoi), *'E-instruado en Litovio'* (Vera Valentaitė), *'Kulturo de E-o'* (Ron Glossop), *'Kiel sukcesigi E-kursojn'* (Julián Hernández), ktp. Certe interesoplena estis kvizo proponata de Josef Shemer el Israelo.

Gravan lokon okupis la Lingva Festivalo. Ĝi okazis en la ĉefstrato en la urbocentro de Kaunas kaj estis prezentitaj lingvoj kiel la japana, franca, angla, hispana, E-o ktp. Por la malfermo kaj fermo de la Festivalo estis uzita speciale konstruita podio, kio ankoraŭ pli videbligis nian aranĝon.

Dum la ekskursa parto de la Konferenco eblis ekkoni la urbon Kaunas mem, la verkojn de la fama pentristo Čiurlionis, la muzeo de popola vivmaniero kaj la parkon de Aukŝtaitija.

La komitato kunsidis dum 4 horoj. Ĉeestis reprezentantoj el Aŭstralio, Britio, Finnlando, Francio, Hungario, Italio, Japanio, Kroatio (KEU), Kubo, Nederlando, Pollando, Rumanio, Ukrainio kaj Usono. La ĉefaj decidoj de la komitato estis la jenaj:

- elekto de Aida Čižikaitė kiel estrarano
- aprobo de provizora buĝeto por la jaro 2006
- refondo de la Lerneja Komisiono
- akcepto de Reprezentanto por Hispanio
- starigo de Scienca Komitato por *IPR*

Informoj pri la sekvajara konferenco en Italio aperos en la sekva numero de *IPR*[3].

*Atilio ORELLANA ROJAS, sekretario*

## Interkultura Simpozio dum la Konferenco

Okazis, enkadre de la ĉi-jara ILEI-Konferenco en Kaunas, unutaga simpozio kunpatronata de ILEI kaj la Vilnius Universitato Kaunas Humanisma Fakultato. Ĉeestis ĝis 50 homoj, ink. kaj konferencanojn kaj universitatanojn. Prezentiĝis 11 kontribuoj, en E-o, la litova kaj la angla lingvoj. *Aida Čižikaitė* kaj *Stefan MacGill* tre sperte interpretis inter tiuj lingvoj - kelkfoje eĉ plibonigis la senson!

La temo de la Simpozio estis sufiĉe vasta – *Interkultura komunikado en edukado* – permesante larĝan gamon da kontribuoj, de priskribaj paperoj pri

[3] NdlR: En la sekva numero aperos pli detala raporto de s-ro Smits pri la ĉi-jara konferenco.

kulturoj samtempe estas la nepraj kondiĉoj por tiu celo.

**STRATEGIAJ CELOJ 2002–2007**
**Edukado**

- Promocio de la edukado kiel fundamenta rajto akorde kun la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj
- Plialtigo de la kvalito de edukado per diversigo de la enhavoj kaj metodoj kaj promocio de universale komunaj valoroj
- Promocio de eksperimentado, novigado kaj disvastigado kaj divido de la informoj kaj plej bonaj spertoj same tiel kiel politiko de dialogo en edukado

*El Mezlongperioda Strategio de Unesko por la jaroj 2002 – 2007*

## Edukado al diverseco

La Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj [2] garantias al ĉiu rajton de edukado, kiu devas esti celita al plena evoluo de homa persono, plifortigo de respekto de homaj rajtoj kaj fundamentaj liberoj, promocio de kompreno, toleremo kaj amikeco, kaj subtenado de paco. La Universala Deklaro de Unesko pri Kultura Diverseco [3] kun respektivaj Ĉeflinioj de Agadplano por ĝia plenumado, pli detale reguligas protektadon de kultura kaj lingva diverseco. Ĝi emfazas promocion de la kultura diverseco tra edukado kaj instigas flegadon de pedagogia riĉeco de diversaj kulturoj kaj tradicioj.

Ĉi tiuj kaj aliaj dokumentoj de UN kaj Unesko pri homaj rajtoj, edukado kaj kultura kaj lingva diverseco reliefigas la defiojn kaj taskojn kiuj staras antaŭ la pedagogiaj sciencoj kaj eduksistemaj institucioj en la streboj de la homaro al daŭrpova evoluo, konservado de diverseco, kaj paco. Tri aspektoj de edukado al diverseco povas esti observataj: ***en***, ***pri*** kaj ***por***.

## Edukado *en* diverseco

La kultura kaj lingva diverseco bezonigas multkulturan edukadon kun enhavoj kaj metodoj adaptitaj al diversaj ekonomiaj kaj kulturaj fonoj kaj al plej diversaj bezonoj de la edukatoj. Paul Gorski [4] identigas tri aspektojn de radikaj ŝanĝoj kiujn postulas la edukado en multkulturaj socioj:

- *memtransformiĝo* de la edukanto: havante siajn kulturan fonon, observmanieron kaj komprenon de la homoj kaj okazado ĉirkaŭ si, kiuj lasas spuron en edukspertoj de la edukatoj, la edukanto mem devas konstante ekzamenadi sin kaj transformiĝadi por fariĝi efektive multkultura edukanto;
- *transformiĝo de la lernejo kaj edukado*: kritika ekzamenado kaj transformado de la eduksistemo celita al multkultura edukado devas
    - inkludi la lernanto-centran pedagogion kiu, krom faktoj kaj teoriaj konceptoj, emfazu kritikan kaj kreivan pensadon kaj socian konscion de la lernantoj,
    - oferti multkulturajn instruprogramojn,
    - utiligi multkulturajn rimedojn kaj enhavojn inkluzivajn por diversaj perspektivoj kaj voĉoj de la lernantoj, kaj
    - evoluigi normitan sistemon de kontinua pritaksado de la edukrezultoj kaj efikoj de la ŝanĝoj;

**Tutmondiĝo kaj multkultureco**

Kvar principoj devas prezenti la strategion de multkultureco en tutmondiĝo:

- Defendo de tradicioj povas bremsi la homaran evoluon
- Respekto de diferencoj kaj diverseco estas esenca
- Diverseco sukcesas en la interdependa mondo kiam la homoj havas multoblajn kaj komplementajn identecojn kaj apartenas ne nur al la loka komunumo kaj unu lando sed ankaŭ al la tuta homaro.
- Atento pri malekvilibroj de ekonomia kaj politika povo helpas preventi minacojn al kulturoj de malpli riĉaj kaj malpli fortaj komunumoj

*El* **Raporto pri Homara Evoluo en 2004**

- *transformiĝo de la socio*: la fincela senco de la multkultura edukado kaj investado en ĝin estas ĝia kontribuo al progresiga transformado de la socio kaj subteno al socia justeco sen reproduktado de privilegioj al la jam privilegiitaj.

La multkultura edukado en siaj komencoj antaŭ kelkdeko da jaroj, en kunteksto de la movadoj por minoritataj, civitanaj kaj virinaj rajtoj, fokusiĝis al la problemoj de plurkultura kunvivado en lokaj komunumoj kaj al plurkultura etoso en la klasĉambro. Hodiaŭ ĝi renkontas tiujn problemojn eĉ pli forte, sed ĝia emfazo turniĝas al la tutgloba interligiteco kiu ĉiam pli bezonigas evoluigon de la konscio, kompreno kaj estimo de kulturaj similecoj kaj diversecoj kiuj unuigas la homaron.

## Edukado *pri* diverseco

Kompreno de la diverseco kaj konscio pri la bezono de ĝia konservado estas esencaj por paca vivo en la mondo de diverseco. Milton Bennet en

*Mi ne volas, ke mia domo estu enmurigita de ĉiuj flankoj nek miaj fenestroj ŝtopitaj. Mi volas, ke kulturoj de ĉiuj landoj blovu ĉirkaŭ mia domo laŭeble libere. Sed mi rifuzas, ke ajna el ili forblovu min de mia grundo.*

Mahatma Gandhi

[6], kiel prezentite en [7], eksplikis sian Evolu-Modelon de Interkultura Sentivo kiel kadron por klarigi reagojn de homoj al kultura diverseco. Li identigis ses evoluŝtupojn laŭ kreskanta kompleksceco de interkulturaj spertoj esprimitaj per diversaj sintenoj kaj kondutoj: *ignoro*, *defensivo*, *minimumigo*, *akceptemo*, *adaptiĝo* kaj *integriĝo*. La unuaj tri estas karakterizataj kiel *etnocentraj*, ĉar homo en tiu evolunivelo de interkultura sentivo vidas sian kulturon iasence en la centro de la realo. La ceteraj tri ŝtupoj estas *etnorelativaj* kio signifas, ke propra kulturo estas observata en kunteksto de aliaj kulturoj.

*Ignoro* de kultura malsameco estas stato en kiu propra kulturo estas observata kiel la sola reala. Homoj kun tiu ŝtupo de interkultura sentivo malinteresiĝas pri kulturaj diferencoj, sed povas reagi agreseme kun celo elimini diferencon kiam ili sentas sin atakataj de ĝi.

*Defensivo* kontraŭ kultura malsameco estas stato en kiu propra (aŭ adoptita) kulturo estas la sola bona, supera kompare kun la aliaj. Homoj kun defensiva percepto de kulturaj diferencoj sentas sin minacataj de aliaj kulturoj kaj reagas tre kritikeme ĉe ajna renkontiĝo kun ili.

*Minimumigo* estas stato en kiu elementoj de propra percepto de la kultura mondo estas observataj kiel universalaj. Ĉi tio povas konduki al banaligo aŭ romantikigo de aliaj kulturoj. Homoj kun ĉi tia kompreno de interkulturaj rilatoj emas insiste postuli korektadon de alikultura konduto por akordigi ĝin al siaj atendoj.

*Akceptemo* al kultura malsameco signifas observadon de propra kulturo kiel unu el multaj egale kompleksaj mondkonceptoj. Homoj kun ĉi tiu ŝtupo de interkultura sentivo tamen povas havi negativan starpunkton pri la diverseco, sed rilatas al ĝi scivoleme kaj kun respekto.

*Adaptiĝo* al kultura malsameco signifas plivastigon de propra mondkoncepto per elementoj de aliaj kulturoj, kapablon "rigardi la mondon per malsamaj okuloj" kaj pretecon al intenca ŝanĝo de propra konduto por pliefikigi komunikadon kun alia kulturo.

*Integriĝo* estas la stato kiu inkluzivas personan sperton de moviĝo en kaj el diverskulturaj mondkonceptoj. Ĝi kutime karakterizas minoritatojn kaj migrantojn, kaj ne nepre estas pli bona ol la ŝtupo de adaptiĝo.



La edukado al diverseco celas levi la interkulturan sentivon al la etnorelativaj ŝtupoj.

**Edukado *por* diverseco**

La edukado al diverseco havas tute praktikan celon evoluigi la kapablon por bona orientiĝo en diverskulturaj komuniksituacioj kaj por sukcesa komunikado kun homoj el diversaj kulturoj, alivorte – evoluigi interkulturan kompetenton de la edukiĝantoj. Temas pri kompleksa koncepto, sed koncize, la interkultura kompetento inkluzivas:

- posedon de bazaj konceptoj de kulturo
- senton de propra kultura identeco
- rekonon de aliaj kulturoj
- konscion kaj akceptemon pri diverseco de ekzistomanieroj.

**Transnacia edukado**

Ĉiu etna lingvo estas ligita al difinita kulturo kaj naci(ar)o. Ekzemple, la lernejano, kiu studas la anglan, lernas pri la kulturo, geografio kaj politiko de la anglalingvaj landoj, precipe Usono kaj Britio. La lernejano, kiu studas E-on, lernas pri la mondo sen limoj, en kiu ĉiu lando prezentiĝas kiel hejmo.

Manifesto de Prago, 1996

La interkultura kompetento kiel edukcelo unue aperis en la kadro de lingvolernado, sed ĝi transiras la limojn de lingva komunikkompetento. Ĝi rilatas al kulturo de dialogo, paco kaj senperforta solvado de konfliktoj, kiujn ankaŭ la E-movado akceptas kiel siajn fundamentajn celojn.

**Anstataŭ konkludo**

La tutmondiĝo kaj multkultura edukado surscenigas demandojn kiujn la E-movado resumus kiel "paca kaj egalrajta kunvivado en tutmonda familio". Internaciaj kaj naciaj, registaraj kaj neregistaraj organizaĵoj kaj instancoj investas grandajn rimedojn kaj laboron en la homaran evoluon. Edukado al diverseco havas fundamentan rolon en la evoluprocezo kaj Esperanto en ĝi trovas sian lokon. Ĉi tiu temo estos plu traktata en daŭrigo [8] de ĉi tiu artikolo en la sekvonta numero de *IPR*.

**Referencoj:**

[1] http://hdr.undp.org/reports/global/2004/ , Human Development Report 2004

[2] http://www.unhchr.ch/udhr/lang/eng.htm , Universal Declaration of Human Rights

[3] http://unesdoc.unesco.org/images/0012/001271/127160m.pdf , UNESCO Universal Declaration on Cultural Diversity

[4] http://unesdoc.unesco.org/images/0012/001254/125434e.pdf, *Medium-Term Strategy for 2002-2007 – Contributing to peace and human development in an era of globalization through education, the sciences, culture and communication*

[5] Gorski, P. (1995/2005) EdChange Multicultural Pavilion: *Working Definition*. http://www.edchange.org/multicultural/initial.html

[6] Bennett, M.J. (1993) Towards ethnorelativism: A developmental model of intercultural sensitivity. In M. Paige (Ed.), Education for the intercultural experience. Yarmouth, ME: Intercultural Press.

[7] Bennett, M., Hammer, M. (1998) The Developmental Model of Intercultural Sensitivity. http://www.mcli.dist.maricopa.edu/learnshops/multicultural/docs/dmis.pdf

[8] Petrović, R. (2005) Kultura kaj lingva diverseco en edukado – evolutendencoj, *IPR* 2005/4 (aperonta)

*Radojica Petroviĉ, radp@ptt.yu*

## Dumkongresa lingvoekzercado kun *www.edukado.net*

Post la pekina debuto en Vilno la porinstruista retejo *edukado.net* denove okazigis lingvoekzercigajn kursojn por komencantoj kaj mez-niveluloj.

*Katalin Kováts*, redaktoro, kun sia kolego (kaj edzo) *Sylvain Lelarge* demonstris kiel la materialoj de edukado.net povas servi por ĝojplena kaj efika lernado de E-o.

En la ĉina ĉefurbo centoj partoprenis tiajn lecionojn pasintjare, la salonoj dediĉitaj por ĉ. 100 personoj montriĝis malgrandaj, la antaŭe pretigitaj demonstriloj ne ĉiam sufiĉe grandaj, la multobligitaj disdonaĵoj neniam sufiĉaj. Kiel eblis prepariĝi por la ĉi-jara amas-kursaro?

UEA disponigis iom pli grandajn salonojn kaj la instruantoj decidis uzi (funkciantajn!) teknikaĵojn, ĉefe ekranprojekciilon, kiu donis eblon montri grandformate demonstrilojn, tekstojn, helpi kolekti erarojn. Estis solvitaj – helpe de voluntuloj kaj tre subtenema deĵorantaro – la rapida reproduktado de disdonaĵoj, kiam la planita kvanto ne sufiĉis. Ĉiukaze la intereso estis pli granda ol antaŭvideblis.

La originala ideo estis dum kvar tagoj en du paralelaj grupoj prezenti la samajn lecionojn en la du sinsekvaj horoj, kaj tiel la publiko ĉiutage havintus unu novan kursohoron. Tio signifis malpliigi la lerno-materialon, sed ebligi al pli da personoj la partoprenon.

La planon efektivigi eblis nur en la dua nivelo. Ĉe la komencantoj la partoprenantoj simple ne volis foriri, restis ankaŭ por la posta leciono, kiu – sekve – devis esti daŭrigo kaj ne ripeto de la antaŭa, samtaga kursero. Tiel la mezniveluloj spertis 4 diversajn lecionojn dum la komencantoj entute 8-lecionan kurson.

La celo de la partoprenantoj estis tutevidente diversaj. Ili venis parte por vere lerni, ekzerci la lingvon, parte por spertiĝi pri la instruado, observi la lecionojn kaj la laboron de la gvidantoj. La publiko grandparte regule aperis. Porokazaj vizitantoj venis nur por unu-du horoj en ambaŭ grupoj.

La salonoj ĉiam estis sardin-plenaj, la du lecionojn partoprenis en ĉiu sesio sume ĉ. 150-170, dum la semajno temis pri entute ĉ. 1400 pohoraj lernemuloj. Laŭ proksimuma kalkulo 300 diversaj personoj sekvis regule kurson, inter ili grandparte litovoj, sed la grupoj ĉiam estis bunte internaciaj.

| | **Lundo** | | **Mardo** | | **Ĵaŭdo** | | **Vendredo** | | **SUME** |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Lecionoj | 1a | 2a | 1a | 2a | 1a | 2a | 1a | 2a | |
| **Komencantoj** | 120 | 110 | 130 | 120 | 120 | 130 | 120 | 130 | 980 |
| **Mezniveluloj** | 50 | 50 | 60 | 60 | 50 | 50 | 60 | 50 | 430 |
| **SUME** | 170 | 160 | 190 | 180 | 170 | 180 | 180 | 180 | **1410** |

Dum la lastaj lecionoj estis disdonataj taksofolioj en ambaŭ grupoj, el kiuj revenis 156 folioj kun tre bonaj opinioj. Laŭ la rimarkoj en la komencanta grupo plaĉis al la partoprenantoj la modern-stila kaj amuza instruado, la bonkvalitaj kaj belaj demonstriloj, la bonhumura "*bela, juna, svelta, riĉa, feliĉa*" instruistino, la uzo de moderna teĥnologio, ludemo kaj eblo eĉ en tia amoso komuniki, interagi kaj vere lerni.

En la grupo de mezniveluloj estis sukcesaj la paroligaj ekzercoj, grupaj aktivaĵoj, traktado de enhave interesaj, aktualaj, amuzaj ekzercoj kaj taskoj, vivplenaj rakontigoj.

La partoprenantoj multe ridis kaj ankaŭ spertiĝis (lingve, metodike) dum tiuj lecionoj kaj ne malmultaj komentis per simila frazo: "*La plej bona kurso de mia vivo*. Dankon!"

La enhavo de tiuj kursoj, la leviĝintaj pedagogiaj demandoj estos konsulteblaj en la METIEJO de la paĝaro, la uzitaj eklzercoj elŝuteblas el la LERNILOTEKO.

Dum la kursoj plurfoje okazis filmado danke al *Francisko Randin* kaj *Tim Morley*. Eroj de la de ili filmitaj lecionoj eniros la filmmaterialon de la nova projekto KATEDRO[4].

*Raportis: Katalin Kováts kaj Sylvain Lelarge, kursgvidintoj*



*Lingvoekzercado kun edukado.net – UK, Vilno, instruas Katalin Kováts*

[4] Pri la projekto legu pli en la Jarraporto de ILEI kaj sur la frontpaĝo de www.edukado.net.





## Barato

Tri 13-jaraj lernantinoj de E-o en la urbo Bangaloro volas korespondi (papere) kun pli malpli samaĝaj esperantistoj. Sendu viajn proponojn kun adresoj por papera poŝto al: *Venkatesh Reddy, esperovr@yahoo.co.in* aŭ: *Gabriele Corsetti, gabriele_corsetti@hotmail.com.*

## Brazilo

**Nova sekciestro de ILEI-BR**

La 17-an de julio 2005 brazilaj ILEI-anoj elektis novan sekciestron, ĉar la ĝisnuna sekciestro anticipe deklaris al la monda estraro de ILEI kaj al la nacia sekretariejo de la Sekcio sian neeblecon kandidatiĝi al la reelektado. La balotado okazis perpoŝte. La nova estro estas Antonio Felix da Silva, 60-jara, aktiva esperantisto ekde la sepdekaj jaroj, enloĝanto de Santa Catarina, nuntempe instruanta E-on en




*Surfote: ĉeestantoj de la sesio post la kontrolado de la balotiloj (la nova sekciestro videblas sur la mura afiŝo)*

Federacia Universitato de tiu ŝato (UFSC). Li estas fondinto de E-Klubo de Montes Claros (urbo de la ŝtato Minas Gerais), skribinta la historion de la movado en tiu urbo; li estas rajtigita de IEI (Internacia E-Instituto) uzi "Cseh-Metodon" por instruado de la lingvo kaj li kunlaboras en la movado kiel tradukisto, verkisto kaj disvastiganto. Koncerne al ILEI, li jam tradukis artikolojn de *Internacia Pedagogia Revuo*. Li estas aŭtoro de la poezilibro Empatia (1994), antaŭe skribinta aliajn, kune kun aliaj aŭtoroj, 23 librojn enhavantajn rakontojn kaj poeziaĵojn. Li estas membro de Beletra Akademio de Montes Claros (MG) (ekde 1994) kaj de Filozofia Akademio de Santa Catarina (ekde 2003). Li estis delegito de UEA en Montes Claros (de 1996 ĝis 2001), estante nuntempe Vic-Delegito de tiu asocio en Florianópolis.

## Finnlando

**La sesa sinsekva kursosemajno en Popola Instituto de Valamo**

Ĝi okazis en Heinävesi, orienta Finnlando, de la 4-a ĝis la 8-a de julio 2005. En la kurso partoprenis 5 gekursanoj, 2 je la elementa kaj 3 je la daŭriga nivelo. Instruistoj estis ĉi-jare *Mohamed Bettahar* (denaske de Alĝerio, loĝanta jam dum jaroj en Turku, Finnlando) kaj *Tiina Oittinen*. Ambaŭ gvidis ambaŭ kursonivelojn kaj Tiina agis krome ankaŭ kiel kursorespondeculo. En la etaj grupoj la lernado estis tre intensa. Por ambaŭ kursoniveloj estis instruado de 20 lecionoj, po 45-minutaj. Krome okazis komunaj ekskursoj, kiam la kursanoj konatiĝis kun la monaĥeja areo, kie la Popola Instituto de Valamo situas. Vespere ĉiuj kursanoj sidis kune diskutante kaj ricevante informojn pri diversaj aferoj. La ĉi-jara ĉefinstruisto, Mohamed Bettahar, rakontis dum vesperaj kunestadoj pri siaj spertoj en Finnlando kaj instruis al la kursanoj la araban alfabeton kun kelkaj esprimoj.

Dum la lasta, festa vespero la kursanoj ĝuis la bongustan manĝaĵon en Valamo-stilo. Tiam venis viziti la kurson du gastoj, kiuj vigligis ankaŭ la esperantlingvan diskutadon. Al la vespera programo apartenis tikla kvizo, talenta muzikprezentado, tradicia rakonto kaj komuna kantado.

La tradicio de Valamo daŭros venontsomere. La kursosemajno estos 3.-7.7.2006. La ĉefinstruisto estos denove *Atilio Orellana Rojas*, kun kursorespondeculo *Tiina Oittinen* kaj, se venos sufiĉe da partoprenantoj, ĉeestos ankaŭ dua instruisto. Pliajn informojn pri Valamo-kursoj petu de *Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, www.esperanto.fi.*

*Tiina Oittinen, eafsekretario@esperanto.fi*



*En la foto de maldekstre: instruistoj Tiina Oittinen kaj Mohamed Bettahar, elementkursanoj Talvikki Saarenkari kaj Marketta Turunen*

## Francio

**Korespondpeto**

Ni estas franca asocio (ILO), kies celoj estas instrui la lingvon kaj samtempe konigi ĝin en la sudo de la pariza regiono. Ni planis ĉi-jare organizi retmesaĝan korespondadon inter unu lernejo de nia urbo (Châteaufort) kaj alia eŭropa nefranclingva lernejo.
Nia lernejo tute ne estas e-ista, sed nia asocio volas montri, ke pere de E-o, oni povas korespondi. Unu instruistino konsentas, sed ŝi petas, ke la projekto estu serioza.
La lernantoj kune verkos leteron franclingve, nia asocio tradukos ĝin kaj sendos la tradukon samtempe al ambaŭ klasoj. Niaj lernantoj estas 7-ĝis-11-jaraĝaj.

*Michel SLAGMULDER <mslagmu@yahoo.fr>*

## Hungario

En la hejmpaĝo de Hungara Eduka Ministerio oni povas trovi informojn pri matureca ekzameno en Esperanto. Vidu ĝin ĉe: *http://www.om.hu/main.php?folderID=266&articleID=5621&ctag=articlelist&iid=1*. La taskojn vi povas elŝuti de la adreso: *http://www.om.hu/letolt/okev/doc/erettsegi_2005/k_eszp_fl.pdf*

*laŭ informoj de Ivano Bujdoso*

## Japanio

**650 studentoj lernis E-on en du universitatoj**

En kelkaj japanaj universitatoj kaj ŝtataj kaj privataj jam kelkajn jarojn E-o estis unu el la regulaj studobjektoj, sed la nombro de studentoj ne estis tiel granda. Ĉi-jare dum la unua semestro (aprilo-julio) entute 650 studentoj lernis E-on en du ŝtataj universitatoj.

En Universitato Saitama, la nomoj de la kursoj ne rekte rilatas al E-o tamen E-o fakte estis celobjekto de la kursoj. Unu estas "Nacio kaj kulturo de slavaj landoj + studo pri Rusa kulturo" kun la subtitolo "Internacia lingvo naskita en Pollando", 90-minuta lekcio ĉiuĵaŭda kun 2 poentoj, kaj ĝin ricevis 210 studentoj. Prelegis ruslingva profesoro *SASAKI Teruhiro*.

Alia kurso estis "Studo pri la kulturo de sfero germanlingva" kun la subtitolo "Baza seminario pri Eŭropaj kulturoj". Germanlingva profesoro *ADATI Tadao* prelegis kaj instruis E-on al 100 studentoj ĉiusemajne.

Somera Intensiva Kurso de E-o en Universitato Kagawa okazis ekde la 8-a ĝis la 11-a de aŭgusto. Ĝi estis tuttaga kurso kun du poentoj kaj ĝin ricevis 335 studentoj. *S-ro TANI Hiroyuki* de Universitato Osaka por Fremdaj Studoj gvidis la kurson, tamen ĝin aranĝis iu profesoro neesperantista kiu fake studas pri Heinrich Heine. La plejparto de la kurso estis por studo de la lingvo mem, tamen *s-ro TANI* prelegis ankaŭ pri la historio de E-o, pri Zamenhof, pri la provoj de aliaj internaciaj lingvoj ktp.

En Japanio, pro la misinterpreto de "tutmondiĝo", fremdlingva lernado simple signifas lernadon de la angla kaj aliaj lingvoj estas maljuste traktataj en multaj universitatoj.

Kursoj kun tiom multe da studentoj eble ne taŭgas por lingvolernado versenca, tamen grave estas, ke tiom multaj studentoj nun scias pri E-o. Ankaŭ dum la dua semestro, en Universitato Saitama, la supre menciitaj du profesoroj planas aliajn kursojn pri E-o.

*ISIKAWA Tieko, sekciestro*



## Usono

**El la jarraporto de la usona sekcio**

Ĉi-jare AAIE (Amerika Asocio de Instruistoj de E-o) havis 40 membrojn, kiuj aŭtomate estas membroj de ILEI. AAIE finance subtenis ILEI tiel, ke anstataŭ por 40 ĝi pagis kotizon por 60 membroj.

AAIE eldonas kvaronjaran, dulingvan bultenon kun la redaktado de s-ino *Doroteo Holland.*

Dum la ĉi-jara jarkunsido oni (re)elektis la sekvajn estraranojn: prezidanto: *Phil Dorcas* (reelekto); vic-prezidanto: *Henry Studer*; koresponda sekretario: *Sally Lawton* (reelekto); kasisto: *Mary Napolitan.*

10 personoj ekzameniĝis ĉi-jare, kaj la korespondan kurson de ELNA partoprenis 128 kursanoj.

La plej sukcesa kursaro ekster la kadro de AAIE estis la trisemajna, trinivela NASK (Nord-Amerika Somera Kursaro).

*laŭ Doroteo Holland, sekciestro*

**Pri NASK 2005**

La kvaran fojon la Nord-Amerika Somera Kursaro okazis ĉe S.I.T. apud Brattleboro en la bela kaj verda ŝtato de Vermonto. Inter la 3a kaj la 23a de julio 24 studentoj partoprenis en la ĉi-somera kursaro. Laŭ sia lingvoscio ĉiu studento elektis unu el la tri niveloj. *Lee Miller* (Usono) instruis la unuan kurson por komencintoj. La meznivelan kurson gvidis *Birke Dockhorn* el Germanio kaj *Paŭlo Gubbins* el Britio direktis la trian nivelon, kies temo estis *Originala dramo en E-o*. En ĉi tiu kurso la lernantoj legis, provludis elektitajn scenojn kaj vigle pridiskutis teatraĵojn de 1905 *La duonokulvitro* de Aŭgusto Baissac ĝis *La kripto* de Julian Modest (1987) kaj ankoraŭ ne eldonita dramo (2005) de la instruisto. Lunde, merkrede kaj vendrede je la 14h00 multaj studentoj el ĉiu nivelo partoprenis en la bonega gramatika seminario de Bertilo Wennergren, aŭtoro de la reta *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko.*

Dum la posttagmezo oni estis libera por fari hejmtaskojn, konversacii en Esperanto, butikumi en Brattleboro aŭ partopreni la gramatikan seminarion. Preskaŭ ĉiuj ĉeestis la Vesperan Programon je la 19h00. Tie ni ĝuis interesajn programojn, ekzemple pri Nepalo, Aŭstralio, Makedonio, Anglio, origamoj, la E-Movado, kaj similaj. La vesperajn programojn organizis *Tim Westover*, redaktoro de la Naska Fasko, la ĉiutaga ĵurnalo al kiu studentoj kaj instruistoj kontribuis per informoj, opinioj, eseoj, kaj

distraĵoj. *Tim* aranĝis ankaŭ la semajnfinajn ekskursojn en la sudvermonta regiono. Dum la tri semajnoj ni spertis du aparte specialajn eventojn: (1) la unuan dimanĉon venis granda grupo da esperantistoj de Bostono por babili kaj manĝi kun ni; (2) la lastan mardon venis *Humphry Tonkin* prezidanto de la *Esperantic Studies Foundation* kaj iama prezidanto de UEA por prelegi ĉe la vespera programo pri *"la Usona Deklaracio pri Sendependeco"*.

Je la fino de la kursaro evidentiĝis, ke ni sukcesis plibonigi nian lingvokapablon, multe lernis pri E-kulturo kaj historio de la movado kaj havas amikojn, kun kiuj ni daŭre komunikos. Ni adiaŭis, esperante, ke ni vidos unu la alian ie, iam denove en Esperantujo.

Vizitu la paĝaron de la kursaro ĉe: *http://www.medialabinc.net/nask/2005/*

*Don Houpe*

## InterKultura esploro: kiaj ni estas?

InterKulturo kiel eduka projekto povas sukcese aplikiĝi en lernejoj. Ĝiaj etoso, metodiko, fazoj, varieco de uzataj manieroj, la karaktero de ekzercoj kaj ludoj estas vaste aplikeblaj en la instruado kaj lernado. IK riĉigas la lernantojn per novaj utilaj scioj kaj scipovoj, evoluigas kulturon de interkomunikado, edukas toleremon kaj estimon de unu al alia.

Plenumante variajn taskojn kaj ekzercojn, la infanoj plivastigas sian horizonton, akiras necesajn kaj utilajn spertojn, ekposedas diversajn specojn de ekkona agado.

Tiujn konkludojn mi faris observante miajn lernantojn – membrojn de la grupo "Betuleto". Ĝi estas lerneja grupo konsistanta el 13–14-jaraĝaj infanoj, kiuj jam 2 jarojn partoprenas en la projekto. Dum tiu ĉi tempo ili okupiĝis pri plej diversaj specoj de la agado. Ili rememoris la regulojn de gramatiko ekposedante la novan lingvon, pasigis ne unu horon kun libroj por prepari vican prezenton aŭ respondi al iufoje tre malfacilaj demandoj de kvizo, lernis doni intervjuon kaj iĝis artistoj por ankoraŭfoje memorigi al homoj kiel belega kaj varia estas la mondo en kiu ni loĝas.

Kaj, certe, ili malfermis la mondon por si, legante prezentojn de aliaj grupoj aŭ leterojn de niaj novaj amikoj el ĉiuj partoj de la Terglobo.

Tamen, malfermis ili ne nur la mondon, sed ankaŭ... sin. Jes, ĝuste sin! Dum tiu ĉi jaro de nia IK-agado ni multe eksciis pri ni mem.



Ĝuste pri unu el tiuj "malfermoj" mi volas rakonti.

En novembro 2004, enkadre de IK, estis lanĉita nova diskuttemo – "Mia kulturo". Ĝi celas klarigi nivelon de memkultura konscio ĉe homoj, ilian imagon pri sia kulturo.

Kiam ni en la grupo "Betuleto" vidis la proponitajn demandojn, ni decidis ne simple rakonti pri nia kulturo, sed ekscii komence la nivelon de memkultura konscio de niaj samlernejanoj. Nin interesis, kion ili scias pri kulturo de sia popolo (aŭ popoloj, ĉar ni loĝas en nacia respubliko en konsisto de Rusio), ĉu ili interesiĝas ĝenerale pri ĝi.

Por la esploro ni elektis lernantojn de 5 – 11 klasoj (aĝo inter 10 – 17 jaroj) de tipa urba lernejo. La enketo estis aranĝita dum instruhoro por ke la infanoj havu sufiĉe da tempo por la respondoj kaj ne hastu.

Tio estis facile efektivigebla, ĉar en ĉiuj lernejoj de nia respubliko ni havas devigan lernobjekton speciale dediĉitan al kulturo – "Kulturo de la gepatra regiono". La kolegino kiu instruas pri ĝi dediĉis laŭ mia peto tutan instruhoron al la enketo en ĉiuj klasoj.

Komence de la enketo mi aŭ ŝi (se mi estis okupita pro propraj lecionoj) disdonis al la infanoj malplenajn paperfoliojn kaj diktis la demandojn.

La demandoj estis jenaj: Kia vi imagas vian kulturon? Ĉu vi pensas ke estas multaj homoj, kiuj dividas vian imagon pri via kulturo? Ĉu via kulturo havas iujn distingajn trajtojn? Se jes, kiujn? Kiun imagon havas pri via kulturo tiuj, kiuj ne apartenas al ĝi? Ĉu tiu imago estas ĝusta aŭ oni havas multajn antaŭjuĝojn? Ĉar ni loĝas en unu el naciaj respublikoj de Rusio, ni aldonis ankoraŭ unu demandon: Al kiu kulturo vi atribuas vin kaj kial?

Poste la infanoj memstare respondis dum 45 minutojn. Ni faris neniajn indikojn, suflorojn, sugestojn pri demandoj aŭ eblaj respondoj, sed simple petis, ke ili respondu detale, kun eksplikoj de sia opinio kaj necesaj ekzemploj – por ke la respondoj estu pli enhavoriĉaj por montri la realan nivelon de ilia konscio.

Tiel estis enketitaj 451 lernantoj. La plej longa kaj malfacila etapo estas la prilaboro de la respondoj. Kaj jen kiajn rezultojn ni ricevis.

La enketitoj difinis sian apartenon al tiu aŭ alia kulturo depende de kelkaj kriterioj: al kiu nacio apartenas iliaj gepatroj kaj proksimaj parencoj, ĉu ili scias la nacian lingvon, kie ili loĝas, kies tradiciojn kaj morojn ili observas. Kiel ĉefajn kriteriojn la infanoj indikas la loĝlokon, nacion de gepatroj kaj observadon de tradicioj kaj moroj.

Laŭ tiuj kriterioj, 63 % de la enketitoj opinias sin reprezentantoj de la ĉuvaŝa kulturo, 21 % – de la rusa, 14 % – de ambaŭ kulturoj, 2 homoj atribuis sin al armena kulturo, kelkaj – al miksitaj kulturoj: ĉuvaŝa-tatara (2), rusa-ĉuvaŝa-ukraina (2), rusa-baŝkira-ukraina (1), rusa-ukraina (1), rusa-ĉuvaŝa-finna (1).

Tamen estas interese, ke multaj el tiuj, kiuj konsideris sin apartenantoj al la neĉuvaŝa kulturo, malgraŭ tio priskribis la ĉuvaŝan kulturon respondante al la demandoj rilate al propra kulturo. Ankaŭ interesa momento estas, ke, ekzemple, infano-armeno konsideris sin apartenanto al la rusa kulturo, ĉar li "scias ĉiujn morojn kaj tradiciojn, loĝas en Rusio kaj havas ĝian vivmanieron". Ankoraŭ simila respondo: " Mia patro estas azerbajĝanano, la patrino – rusino, sed mi estas reprezentanto de rusa kulturo, ĉar mi loĝas en ĝi".

La respondoj montris, ke la infanoj precipe bone konas la ĉuvaŝan kulturon kaj ĝiajn distingajn trajtojn. Tio multe dankindas, laŭ mia opinio, al enkonduko de la speciala lernobjekto – ĉuvaŝa lingvo kaj, certe, "Kulturo de la gepatra regiono". Necesas diri, ke instruas ĝin en nia lernejo tre entuziasma persono, vera patrioto de sia gepatra kulturo – *Margarita Vitaljevna Ljubimova*, kiu helpis nin efektivigi la enketon. Ŝi scias kaj rakontas al la infanoj multajn interesaĵojn pri la ĉuvaŝa kulturo, organizas interesajn ekspoziciojn kaj koncertojn, aranĝas kun lernantoj seriozan esploran laboron (kiu kelkfoje gajnis dum Respublikaj scienc-praktikaj konferencoj), invitas al la lernejo interesajn gastojn – talentajn popolajn kompetentulojn kaj ĉuvaŝajn artistojn.

Ankaŭ la ŝtata politiko en la Respubliko kontribuas al la popularigado de la ĉuvaŝa kulturo. Ĝi estas direktita al la apogo de la nacia kulturo, al la altigo de nacia memkonscio ĉe la popolo. En la respubliko aktive reviviĝas la naciaj tradicioj, evoluas la ĉuvaŝa arto (kaj tradicia, kaj moderna), altiĝas la prestiĝo de la ĉuvaŝa lingvo.

Malpli detale la infanoj skribis pri la rusa la kulturo. Iliaj respondoj pri ĝi estis pli koncizaj, distingiĝis per multaj jenaj kaj similaj frazoj: "La rusa kulturo estas tre riĉa", "slava", "ankaŭ religia (kristana)", "havas multe da grandaj nomoj kaj atingaĵoj". Kelkaj infanoj eĉ menciis, ke ĝi estas diversforma, ĉar inkluzivas diversajn kulturojn. Tiu opinio, ŝajnas al mi, estas sekvo de tio, ke Rusio ĉiam estis multnacia lando.

Konkretajn trajtojn de la rusa kulturo la infanoj preskaŭ ne nomis. Eble pro tio, ke ne estas speciala lernobjekto pri la rusa kulturo. Ĝin infanoj studas enkadre de aliaj lernobjektoj, kiaj estas "Rusa literaturo", "Historio de Patrujo", "Muziko" kaj "Pentroarto". Verŝajne, pro tio la nocio ***rusa kulturo*** pli asociiĝas en la menso de infanoj kun la rusa arto, ol kun la popolaj tradicioj.

Tamen samtempe la infanoj ne apartigas la kulturon de la gepatra lando, gepatra urbo kaj ĝiaj loĝantoj, pro tio al ĝiaj distingaj trajtoj ĉiuj enketitaj atribuis ankaŭ tipajn trajtojn de la nacia popolkaraktero.

Kompreneble, respondante al la demando, la infanoj menciis antaŭ ĉio pozitivajn ecojn de sia popolo. La mankojn indikis precipe lernantoj de pli aĝaj klasoj (aĝo de 16-17 jaroj).

Tio ŝajnas al mi tute natura. Ĉiu homo deziras, ke pri lia popolo oni pensu bone. Kaj la infanoj ne estas esceptoj. Tion konfirmas ankaŭ iliaj respondoj al la demando pri rilato de alikulturanoj al nia kulturo. Estas interese, ke ĉiuj enketitaj perceptis ĝin kiel demandon pri rilato de reprezentantoj de aliaj kulturoj antaŭ ĉio al ni, loĝantoj de Rusio.

Preskaŭ ĉiuj respondoj similas en unu: alikulturanoj pravas, kiam ili parolas pri ni bone, kaj ne pravas, kiam – malbone. La infanoj ne simple konstatis tion, ili energie protestis kontraŭ – laŭ ili – eraraj konkludoj pri rusianoj: "Ni estas ne tiaj!" La infanoj perceptas negativan aliron de reprezentantoj de aliaj kulturoj kiel personan ofendon kaj ĉiel penas ŝanĝi ĝin: "Oni ne povas juĝi pri tuta popolo laŭ kelkaj ĝiaj reprezentantoj", "Kion ajn pri ni oni pensus, Rusio estas bona lando!"

Ĝenerale la enketo montris sufiĉe altan nivelon de memkultura konscio de la infanoj. Kaj ili ofte demonstris ŝaĝon neatenditan por sia aĝo: "Ĉiu popolo opinias sin pli bona ol la aliaj", "Ili [reprezentantoj de aliaj kulturoj – E.N.] rajtas pensi pri ni diversmaniere", "Rilato al fremda kulturo dependas de la homo: se por li estas interese ekscii ion novan, li interesiĝos pri aliaj kulturoj, sekve, pensos ĝuste pri ili".


Kaj kvankam infanoj ne ĉiam povas objektive taksi situacion kaj ĝuste konkludi, tamen ili absolute pravas pri la ĉefa afero: por taksi kulturon, necesas ĝin antaŭ ĉio ekkoni kaj kompreni, sincere interesiĝi pri ĝi.

Kaj ankoraŭ unu gravan konkludon mi faris: la respondoj estis plej diversaj, sed ilin ĉiujn unuigas unu trajto: la infanoj ne kontraŭstarigas(!) diversajn kulturojn, ne dividas ilin en sian kaj fremdajn. Ili estas malfermitaj al ĉiuj kulturoj, kaj tiu cirkonstanco ankoraŭ foje konfirmas, ke Interkulturo malfermas vastajn perspektivojn por lernado kaj edukado de

nova generacio. Mi jam ne unu foje konvinkiĝis pri tio en mia laboro kun "Betuleto". Kaj tial mi tutanime alvokas instruistojn kaj edukistojn kiuj okupiĝas kun infanoj pri E-o, partopreni en la projekto Interkulturo por ke niaj infanoj – la estonteco de nia planedo – kresku kiel vere interkulturaj homoj!

*Elena Nadikova*

## Ni kondolencas



Kun bedaŭro ni sciigas al vi ke en Upplands Väsby, Svedio, post mallonga malsano forpasis *Anita Bergh*. Ŝi estis nia fidela membro dum jaroj, ĉeestis plurfoje niajn konferencojn kaj ĉiam helpis kaj subtenis la Ligon diversmaniere. *Anita* estis redaktoro en 'La Hirundo' pri la serio 'Du demandoj', kaj multe laboris por libroservo kaj E-Centro en Stokholmo. Ŝi estis konata ankaŭ pro intervjuoj, kiuj estis dissenditaj pere de radiostacioj en multaj landoj.

## Intervjuo kun Oliver Mazodze, instruisto el Zimbabvo

*La aŭstralia esperantistaro okazigis ĉi-januare sian 20-an somerkursaron. Laŭ la ideo, ke E-o estas kaj estu internacia movado, la organizantoj de la aranĝo invitis kelkajn eksterlandajn E-instruistojn. Okazis, kio estis atendebla: la decidpovaj instancoj ne enlasis en la landon la ukrainan instruiston, sed je agrabla surprizo la invitito el Zimbabvo vizon ricevis. Tiel mi kaj la ceteraj ĉ. 80 partoprenantoj de la adelajda kursaro povis konatiĝi kun la 38-jara Cseh-instruisto Oliver Mazodze.*

K: *Kiel komenciĝis via E-historio?*
O: En 1978, ankoraŭ infano, mi legis pri Esperanto en enciklopedio, sed pliajn informojn neniu povis al mi doni. Inter 1986-91 mi studis en Kubo por ricevi diplomon pri la instruado de biologio. Fine de 1988 mi hazarde





menciis E-on al unu el miaj profesoroj, kiu mem ne parolante la lingvon tamen havis E-lernolibron kaj pruntis ĝin al mi (bedaŭrinde mankis el ĝi multaj paĝoj). Trovinte en ĝi la adreson de la Kuba E-Asocio mi povis peti studmaterialon, kiun fine persone donacis al mi la tiama prezidanto de KEA Jesus Castillo. En 1990 mi jam fondis E-klubon en mia universitato kaj instruis la lingvon al la studentoj kaj profesoroj.

K: *Kiam vi diplomiĝis pri la instruado de E-o?*
O: Laŭ la rekomendo de s-ro Castillo mi ricevis de UEA inviton al la 75-a UK en Havano. Dum ĝi mi partoprenis en la A-seminario pri Cseh-instruado kaj post la UK, dum la ILEI-konferenco, mi plulernis kaj ricevis la diplomon de Cseh-instruisto. Estas interese, ke al UK UEA invitis krom mi pliajn 5 novajn esperantistojn – ili ĉiuj estis miaj studentoj el la E-klubo ĉe la universitato.

K: *Kio okazis post la fino de viaj studoj?*
O: En 1991 mi reiris al Zimbabvo kaj altlerneje instruis biologion (en Masvingo) ĝis 1999. En 1992 mi starigis Zimbabvan E-Instituton (ZEI) kun la celo instrui kaj disvastigi Esperanton en Zimbabvo kaj eventuale en la suda afrika regiono. ZEI registriĝis kiel UNESKO-klubo (1994) kaj post unu jaro ĝi ricevis la oficialan rajtigon de la Ministerio pri Edukado kaj Kulturo por instrui la lingvon al geinstruistoj kaj starigi E-klubojn en lernejoj tra la lando (vd. "Esperanto", majo 1995 p.98).

K: *Ĉu vi sukcesis vojaĝi "kun" Esperanto ankaŭ eksterlanden?*
O: Per la helpo de germana amiko Harald Schmidt mi partoprenis en 1995 en la Tutafrika E-Kongreso en Tanzanio. La sekvan jaron mi faris mallongan instruvojaĝon tra Afriko: Malavio, Zambio, Mozambiko, Sud-Afriko.

K: *Kiun instrumaterialon vi uzis tie?*
O: Mian propran tekston. Ĝi enhavas nur 5 lecionojn, sed la tutan bazan gramatikon de Esperanto. En multaj kazoj mi instruis vespere, post kiam la homoj finis sian laboron. Kutime mi instruis 3 lecionojn kaj la lernantoj

devis la studadon daŭrigi mem. Klubnivele mi instruis Esperanton denove en Kubo, kien mi revojaĝis por magistriĝi pri animala fiziologio ĉe Havana Universitato (1999-2001).

K: *Ni scias, ke la plejparto de la afrikaj landoj havas ekonomiajn problemojn. Ĉu la partoprenintoj de viaj kursoj povis al vi pagi?*
O: Tute ne. Se mi postulus pagon, mi forpelus la lernontojn. Tial mi klopodas minimumigi la elspezojn. En 1996 estis la Eduka Fondaĵo "Carson" (jam ne ekzistas), kiu subvenciis mian kurson por instruistoj en Zimbabvo. Ofte helpadis ankaŭ s-ro Hans Bakker. Cetere mi mem pagas la elspezojn.

K: *Ĉu vi reiris el Kubo al Masvingo?*
O: Mi ŝanĝis mian laborlokon, nun mi lektoras pri fiziologio ĉe Ŝtata Universitato en Bindura. Kompreneble, ankaŭ tie mi starigis E-klubon kaj daŭrigas la laboron kadre de ZEI.

K: *Kiujn aktualajn bezonojn vi alfrontas tie?*
O: Ege utilus, se ni havus propran, eĉ se modestan komputilon kun presilo kaj fotokopiilon.

K: *Tuj post via Cseh-instruistiĝo vi membriĝis al ILEI. Ĉu vi agas ankaŭ en aliaj E-organizoj?*
O: Mi estas membro de Asocio por nova biologia nomenklaturo (NBN) kaj de Akademio Internacia de Sciencoj San Marino (AIS).

K: *Kiel akceptas vian fortan E-engaĝiĝon via propra familio?*
O: Mia edzino Gracious iomete konas la lingvon kaj mi instruas Esperanton al miaj du geinfanoj: 8-jara Sergio kaj 6-jara Lynn Gabriella.

K: *Kiajn spertojn kaj impresojn lasis en vi via aŭstralia instruado?*
O: La plej okulfrapa estas por mi la ĉeesto de multaj plenkreskuloj. Nia movado en Zimbabvo inkluzivas nur junulojn, ĉar ilin ni povas kunvenigi senpage en iliaj kolegioj k.s. La plenkreskuloj laboras, loĝas dise, ne estas mono por la vojaĝkostoj aŭ por la luado de kunvenejo.

K: *Kiuj aktualaj taskoj atendas vin hejme?*



O: Unue mi ŝatus rekontakti la esperantistojn, kiuj partoprenis en la kurso por instruistoj en 1996 kaj refreŝigi iliajn sciojn. Por la ĝenerala varbado necesus produkti faldfoliojn. Mi volas aranĝi surstratajn ekspoziciojn kaj pere de la gazetaro informi pri Esperanto en naciaj lingvoj de Zimbabvo.
K: *Al viaj planoj multajn sukcesojn, Oliver! Kaj ĝis la revido!*

Por kompletigi la bildon pri la E-vivo de Oliver ni aldonu, ke li ankaŭ verkas. Kelkaj liaj poemoj aperis en la iama bulteno de ZEI "Suda Stelo". Se vi ŝatus scii pri li pli, uzu la retadreson <omazodze@yahoo.com>

*Intervjuis: Katja Steele*

***Oliver Mazodze:Pro vi, mi luktos***

*El ĉiuj belaĵoj de l'mond',*
*Subite aperis vi.*
*Sufiĉis nur unu rigard',*
*Kaj mi sciis, ke mi estas trovinta*
*La respondon je miaj demandoj;*
*Kaj nun, en la mond',*
*Ne estas por mi pli ol vi:*
*Vi, kiu elrabis mian koron,*

*Vi, kiu min frenezigas,*
*Vi, kiu alportis tentojn*
*Kaj maltrankviligis mian koron;*
*Kaj nun, tiu ĉi obstina kor'*
*Ĵuras vivi nure por vi,*
*Kvankam vi ĝin ne atentos;*
*Kaj mi ja scias, ke pro via am', pro vi*
*Se nepros, laŭbezone, mi luktos.*

## Por via notlibro

### Manlibro pri Instruado de Esperanto

*Pretigita de internacia teamo de lingvoinstruistoj, redaktita de Katalin Kováts*
*Eldonis: ILEI/Hago 2005. (2a eld.) - ISBN: 8096904264.*

Jen eble la plej signifa eldonaĵo de ILEI tra lastaj jaroj. En 148 paĝoj kaj kompakta formato, jen praktika gvidilo por instruistoj kaj instruantoj kiuj (vole aŭ preskaŭ kontraŭvole) trovis sin antaŭ la devo instrui nian lingvon. Unuflanke pedagogie kompetenta, aliflanke jen tre praktika verko kun konkretaj konsiloj. Ĝi levas multajn temojn kaj dilemojn kiujn vi mem frontos en instrua rolo. La verko havis elektronikan version antaŭ unu jaro, nun ĝi aperas post funda revizio kaj kompletigo en plaĉa papera eldono. La preskvanto estis nur 300, el kiuj plene duono jam forvendiĝis en UK.
La vendoprezo ĉe UEA kaj ILEI estas 7.50 EUR. Ĝi estas havebla de diversaj libroservoj. Mendu de ILEI ĉe *Stefan MacGill, Pannónia u. 30/1/6, HU-1136 Budapest, Hungario aŭ stefan.macgill@gmail.com*

Ĉe ILEI la prezo inkluzivas la sendokostojn, ĉe UEA ili estos aldonitaj. La verko estos la deviga teksto por la kurso pri situacia lernado okazonta en la seminario de ILEI/GEA en Herzberg, Germanio komence de oktobro (vidu la aliĝilon en *IPR* 2005/2). *Stefan MacGill*

## Reago

### Ni solvis la „galimatiajn" regulojn

Mi referencas al la artikoleto de *Félix Gárcia Blázquez* en *IPR* 05/1. Jen fine iu, kiu klare komprenas la aferon. Neniam antaŭe mi aŭdis aŭ legis tiom ĝuste klarigita la tialon por opinii adjektivkaraktera kaj -forma la predikativon determinantan la infinitivecon aŭ subpropoziciecan subjekton aŭ objekton: *Resti kun leono estas danĝera; Mi opinias danĝera resti kun leono; Ke li restis kun leono, estis danĝera; Mi opinias danĝera, ke li restis kun leono.* Konsekvence ankaŭ ĉi tiu parteto de la E-a gramatiko estas simpla kaj senescepta: Uzu ĉiam adjektivon (do ne nur kiam tio pli plaĉas, kiel Zamenhof praktikis). Same konsekvence „E-o estas pli facile lernebla ol aliaj lingvoj". Jen du pliaj tialoj, kial subjekto aŭ objekto, kies kerno (normale substantivo) estas infinitivo aŭ kiu estas subpropozicio, havas substantivan karakteron (kaj funkcion), tiel ke iliaj (subjektaj aŭ objektaj) predikativoj havas adjektivan (aŭ kelkfoje substantivan: *Foriri estas danĝero*, sed certe ne adverban) karakteron:

1. Se oni anstataŭigas la infinitivon aŭ subfrazon per korelativo, oni uzas ne „tiel" sed „tia": *Ĉu danĝera? Ankaŭ mi opinias resti kun leono tia; Ankaŭ mi opinias tion tia; Ankaŭ ke li restis kun tigro montriĝis tia; Ili deklaris tion konsilinda → Ili deklaris ne retroiri tia.*
2. Ankaŭ kiel rekta epiteto aŭ subfrazo ĉe substantivo la infinitivo kaj la subpropozicio funkcias same adjektive kiel la suplemento: *Ŝia celo de (= ante al) savado (ante la arbarojn) → Ŝia celo savi la arbarojn → Ŝia celo, ke ŝi savu la arbarojn = Ŝia tia celo.*

Cetere la uzo de adverbo, tiom populara, povas kaŭzi miskomprenojn (*Ili juĝis malĝusta/e, ke li enmalliberejiĝu*), dum la senescepta uzo de adjektivo neniam kreas dusencaĵojn. Dankon *Félix*! Bonŝance la kontraŭ-E-aj lingvistoj ankoraŭ ne scias pri la „galimatioj" de multaj Esperantologoj (imitataj de la E-a amaso). Kiom ili ridindigus nin!

*Marcel Leereveld, Aŭstralio*



## Forumo

### Malfermita fenestro al la mondo

Ekde kiam mi aktivas en la Esperanto-korespondado, mi ricevas regule de gesamideanoj multajn bildkartojn aŭ poŝtmarkojn diverslandajn: ĉefe el Pollando, Hungario kaj ankaŭ kelkfoje el Rusio. Por mi ili estas kiel malfermitaj fenestroj al la mondo, kiun mi ankoraŭ ne konas.

Kiam mi uzis la esprimon «malfermita fenestro al la mondo», mi uzis ĝin en poeta kaj bilda senco. Sed per miaj fruktodonaj interŝanĝoj mi ekkomprenis, ke tiuj vortoj havas tre profundan signifon, eĉ ekzistan, por la esperantistoj, kiuj iĝis la viktimoj de la komunista reĝimo aŭ de la naziismo. Mia korespondanto pola klarigis al mi, ke li ekkorespondis en Esperanto sub la komunismo, por malkovri landojn, kie la libereco estas pli granda. Ĉiu respondo estis por li pruvo, ke la sistemo, pro kiu li suferis, ne estis la ĝusta! Mi paroladis ankaŭ kun polino, kiu de pli ol dek jaroj loĝas kun familio en Svislando; ŝi eksekvis E-kurson en sia lando. Kiam la instruistino alportis la ricevitajn bildkartojn el Kanado, Portugalio, Aŭstralio aŭ ankoraŭ el Ameriko, estis grava kaj ĝoja momento klase! La bildoj estis vere kiel trezoreroj!

Por kiu ĉiam vivis «trankvile» en libera (aŭ liberisma?) lando, tiaj reagoj estas malfacile kompreneblaj. Nur la rektaj kontaktoj povas montri al demokrataj landanoj, kio precize estas la libereco, ja tro ofte tiu rajto ne estas memkomprenebla! Esperanto utilas ĉefe al tio: malkovri reciproke la kulturon kaj la vivsperton de la aliaj, kaj per tio riĉiĝi.

Dank'al miaj kontaktoj en Pollando mi komprenis ankoraŭ pli bone la malĝojon de la pola popolo sekve la morton de la Papo Johano-Paŭlo la II-a. Por poloj Li estis ilia «Patro». Jam televide, kiel pasiva spektanto, mi sentis tiun ĉagrenon, sed per la pruvadoj de samlandanoj, mi povis estimi la malĝojegon en la koroj. Tion neniu ĵurnalisto povintus klarigi tiom sincere. Tiel ĉio iĝas pli kaj pli subjekta, pli persona, pli vera, kiel alivorte la vivo!

Kiam mi ekuzadis la lingvon internacian, mi neniam pensis, ke tiu viruso restos tiom vigla! Mi opiniis, resti nur aŭskultanto aŭ leganto, pasiva, kiel tro ofte en la naciaj lingvoj. Sed hodiaŭ mi povas certigi la dubantojn, ke mi estas aktivulo en la korespondado. Mi mem iniciatis interŝanĝojn kaj, pli grave, mi ricevis bonkorajn akceptojn. La kontaktoj fremdaj igis min kiel malkovranto de mondopartoj, kiuj certe restintus por ĉiam nekonitaj al mi. Sed, mi ankoraŭ ne partoprenis la universalajn kongresojn.

Esperanto estas la ŝlosilo, kiu malfermas la mondpordon. Ĝi estas ankaŭ la plej respektinda metodo por teksi ligojn inter la malsamaj popoloj. Sen forlasi sian hejmon oni povas fari lingvan restadon, ĉie estas la lingvo! Por esti konvinkita pri tio, serĉu do en la interreto! Plie la E-literaturo estas tiom riĉa, ke estas facile legi originalajn verkojn aŭ pli fidelajn tradukojn de grandaj aŭtoroj: alia maniero, por malfermi fenestron sur la mondo.

Al mi venas do grava demando: kial abstini je tiaj avantaĝoj? Kial ne konsideri tiun solvon, kiu pruvis de pli ol unu jarcento, ke ĝi funkcias bonege? Ĉu la mondo pli belas malantaŭ fermitaj fenestroj kaj dikaj kurtenoj?

*Jean-Marc Leresche, Svislando*

## Kiel korekti erarojn?

*Dum UK okazis ekskurso al vilaĝo Veisiejai, kie ni vizitis la lokon de la iama dometo, kie Zamenhof finpretigis la verkon: Unua Libro.*



*Bedaŭrinde la kortuŝiĝon signife mildigis la kolero,*
*kiun instruisto de la lingvo sentas vidante erarojn,*
*eĉ marmoren gravuritajn, laŭdire omaĝe al la Majstro.*




„EN ĈI TIU LOKO ESTIS DOMO EN KIU 1886-1887 JARO LOĜIS KAJ LABORIS DE ESPERANTO LINGVO KREISTO LUDOVIKO ZAMENHOF"

*Rimarkis: K. Kováts*




### LABORKOMISIONOJ

**Azia agado:** Rob Moerbeek
**Ekzamena:** Duncan Charters (prez.), Katalin Kováts (vicprez.), Bill Maxey (sekr.), Probal Dasgupta, Gbeglo Koffi, Mireille Grosjean
**Elekta:** Maritza Gutiérrez (kunvokanto), Ana Montesinos de Gomis, Aurora Bute
**Kontrola:** Ulla Luin, Bengt Jansson, anstataŭanto: Lars Forsman
**Lerneja:** Carola Antskog, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi
**Regulara:** Marija Beloŝeviĉ, Rob Moerbeek, Atilio Orellana Rojas
**Terminara:** Maŭro La Torre, Miroslav Malovec

### KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

EEU: *Eŭropa Esperanto-Unio.* Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola Antskog**, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, *cantskog@kolumbus.fi*
E@I (*Esperanto ĉe Interreto, www.ikso.net*), faka sekcio de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, *www.tejo.org*, poŝtadreso ĉe UEA)
FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj):*
Reprezentanto de ILEI: **Jennifer Bishop**, *esperanto@Education.monash.edu.au*
IEI: *Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.*
UEA: *Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.uea.org.* A-komitatano el ILEI: **Atilio Orellana Rojas**. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Radojica Petrović**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Claude Nourmont**.
UNESKO (en operaciaj rilatoj). Reprezentantoj de ILEI: **François Lo Jacomo**, *72, quai de la Loire, FR-75019 Paris, francois.lojacomo@wanadoo.fr*; **Monique Arnaud**, *Ecole Chemin de l' Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@tiscali.fr*; **Jean-Pierre Boulet**, *17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60*; **Mireille Grosjean**, *Temple 20 pf. 9, CH-2416 Les Brenets, tel/fakso: (+41 32) 932 18 88, mireille.grosjean@rpn.ch*

### MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

Membreco kostas 18 EUR en A-landoj (laŭ UEA-difino) kaj 9 EUR en B-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al reta versio, membreco kostas 4 EUR (A) kaj 2 EUR (B). Bonvenaj estas donacoj al la fondaĵoj de ILEI, konferencaj pagoj kaj abonoj por Juna amiko. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas membrigojn kaj donacojn; simile, perantoj por Juna amiko akceptas abonojn enlande. Por pagoj rekte al la internacia ILEI informu skribe al la kasisto de ILEI: **Sjoerd Bosga**, *Trådragargatan 27D, SE-723 37 Västerås, Svedio. Tel.: (+46 21) 41 70 45, sjoerd@esperanto.se.*
La pagoj povas okazi pere de konto de ILEI ĉe UEA, aŭ al la sveda konto.
* Pagoj al konto de ILEI ĉe UEA: Pri pagmanieroj vidu informojn en la Jarlibro de UEA. Atentu pri aldono de sumo por bankkostoj. Indiku vian nomon kaj landon, mallonge la celon de la pago, kaj unu el la tri kontoj ilek-a (ĝenerala), juna-l (Juna amiko), pike-b (projekto Interkulturo).
* Pagoj al la sveda bankkonto: El Svedio pagu al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Föreningssparbanken. El aliaj landoj pagu al IBAN SE56 8000 0832 7999 4515 0143 kun BIC/SWIFT kodo SWEDSESS. Aldonu 6 eŭrojn por svedaj bankkostoj se vi pagas el ekster Eŭropa Unio.
* Simpla abono de IPR sen membreco: 18 EUR. Reklamtarifoj por IPR: 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon: kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.
ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag sub numero 27.181.064.
Hejmpaĝo de ILEI: *http://www.ilei.info*



### REDAKCIAJ INFORMOJ

**Respondeca eldonanto** (verantw. uitgever): R. Wylleman, *A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende.*
**Presado:** Flandra Esperanto Ligo, *Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, tel: (+32-3)-234 34 00.*
**Redaktejo:** Németh József, *HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5.* Rete: *http://www.ilei.info/ipr/; jozefonemeth@yahoo.com*, tel: *(+36-89) 356-050.* Vicred: *katalin@ikso.net.*
La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: *Rob Moerbeek, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk.* La nunan numeron ni sendis al la presejo la 15-an de sept., **redaktofino por la sekva numero: 31.10.2005**.

# SEKCIOJ

**Albanio:** Vasil Pistoli, c/o Bardhyl Selimi, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, AL-Tirana, *selimib@albmail.com*

**Argentino:** vakas

**Aŭstralio**: Penny Vos, 511 Wyndham Lane/Kanoona, Candelo NSW AU-2550, *penivos@yahoo.com*

**Belgio:** Raymond Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende, *raymond.wylleman@versateladsl.be*

**Brazilo**: Antonio Felix da Silva Rua Engenheiro Francisco Azevedo, 243, Sumarezinho - São Paulo – SP, BR-05030-010, ileibr@linguauniversal.com.br

**Britio:** Tellier Angela, 10 Marina Gardens, GB IP11 2HW Felixstowe, Suffolk, *angela@esperantoeducation.co.uk*

**Ĉeĥio:** Jana Melichárková, CZ-696 02 Ratíškovice 938, *melicharkova@quick.cz*

**Ĉinio:** Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan, *zdchen@public.wh.hb.cn*

**Finnlando:** Carola Antskog, Dragsfjärdvägen 690, FI-25700 Kimito, *cantskog@kolumbus.fi*

**Francio:** Joseph Catil, 5, rue des Calabres, FR-69330 Meyzieu, *joseph.catil@wanadoo.fr*

**Germanio:** Michael J. Scherm, Von Thürheimstr. 47, DE-89264 Weissenhorn

**Hungario:** József Németh, Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász, *jozefo.nemeth@gmail.com*

**Irano:** Hamzeh Ŝafii, P.O. Kesto 17765-184, IR-Teheran, *ilei.ir@esperanto.org*

**Italio**: Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43100 Parma, *silkovojo@aliceposta.it*

**Japanio:** Isikawa Tieko, 103, Tate 1-6-6, Siki, Saitama JP-353-0006, *isksanjo@ff.e-mansion.com*

**Katalunio**: Pedro M. Martin Bututxaga, Arnau Gatell 2-4-2, ES-17300 Blanes, *ileicat@hotmail.com*

**Korea Resp.**: CHO Sung Ho, Department of Biology, Inha Universitato, Incheon 402-751, Koreio, *shcho@inha.ac.kr*

**Kroatio/KEL**: Marija Jerković, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, *mjerkovic@net.hr*

**Kroatio/KEU:** Ivan Bekavac-Basić, Kuŝlanova 59, HR-10000 Zagreb, *ilei_kroatio@teacher.com*

**Kubo**: Marta Alonso Gutiérrez, Malecón 659 entre Belascoaín y Gervasio; CU-10200 Ciudad de La Habana, *kubesp@enet.cu*

**Nederlando:** Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, *iei001@tiscali.nl*

**Norvegio**: Anne-Karin Bondhus, Baldersveg 3C, nr 17, NO-7033 Trondheim, *anne.k.bondhus@itk.ntnu.no*

**Pollando**: Maria Majerczak, ul. Armii Krajowej 7, m. 122, PL-30 150 Krakow, *mmajerczak@gmail.com*

**Rumanio**: Mihai Trifoi, Bl. 1/ap.3, Jud. Covasna, RO-527118 Bixad, *trifoi@honoris.ro*

**Rusio**: Irina Gonĉarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RU-143000, *mirina@online.ru*

**Svedio**: Lars Forsman, Enbarsvagen 17, SE-691 47 Karlskoga, *larsespo@yahoo.se*

**Svislando**: Mirelle Grosjean, Grand-rue 9. Pf. 9, CH-2416 Les Brenets *mireille.grosjean@rpn.ch*

**Togolando**: Attiogbe-Agbemadon B., Mensah, T. I. E. To, B.P. 13169, Lome-TOGO, *esp.togo@cafe.tg*

**Ukrainio**: Nina Daniljuk, prospekt Sobornosti, 32-108, Luck-26, UA-43026, *nina_daniljuk@ukr.net*

**Usono kaj Kanado**: Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr, Santa Barbara, CA 93111-2521 (US), *dorothyh@west.net*

**Venezuelo**: Andrés Turrisi, Cen.Res.Puerta del Este.Torre, Oeste, piso15, ap.153, Av.Madrid, VE-1070 La California Norte, Caracas, *andesp@internet.ve*

# REPREZENTANTOJ

**Armenio**: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv.52, AM-375062 Erevan, *LIDELB@freenet.am*

**Bosnio kaj Hercegovino**: Nimeta Kulenoviĉ, Branica Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajevo

**Ĉilio**: Héctor Campos Grez, Casilla 903, CL-3340000, *hecg@uea.org*

**Estonio**: Helgi Hromova, Pk. 623, EE-12602 Tallinn

**Islando**: Loftur Melberg Sigurjónsson, Traðarberg 13, IS-221 Hafnarfjörður, *loftur@skyrr.is*

**Israelo**: Gian Piero Savio, P.O.K.386, IL-84965 Omer, *gpsa@uea.org*

**Kongo DR**: Ngangu Nduantoni-Bakidila,B.P.13,CD-Lukala, Bas-Zaïre

**Kostariko**: Hugo Mora Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José, *tikoguau@gmail.com*

**Litovio**: Algimantas Piliponis, Kavoliuko 3-93, LT-04325 Vilnius, *piliponis@centras.lt*

**Meksiko**: José de Jesús Corrales C., Belice 116, Fraccionamiento Guadalupe, Durango, Dgo. *jdjcorrales@yahoo.com.mx*

**Nov-Zelando**: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, NZ-6001 Wellington 1, *gwenda.s@ihug.co.nz*

**Portugalio**: João Jose Santos, Apartado 123, PT-5301-902 Bragança, *jjsantosweb@yahoo.com.br*

**Serbio kaj Montenegro**: Radojica Petrović, Bul. oslobodjenja 36, SCG-32000 Ĉaĉak, *radp@ptt.yu*

**Slovenio**: Marija Zlatnar-Moe, Miliĉinskega 66, SI-1000 Ljubljana, *Marija.Zlatnar@guest.arnes.si*

**Uzbekistano**: Eugeno S. Perevertajlo, Abon. jashik 140, Poĉtamt, UZ-700000 Taŝkento, CIS, *esperuzo@mail.ru*